Informilo de Septembro 2019

Numero 42, septembro 2019

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo

Inter la fundamentaj celoj de nia Asocio estas la konservado kaj protektado de lingva diverseco – demando aparte notinda en tiu ĉi Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj. Ni kredas je la graveco de lingva egaleco kaj la rekono de la homaj rajtoj ligitaj al tia egaleco.

La temo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto (20-27 julio 2019), kiu kunvenis en Lahti, Finnlando, kun partopreno de preskaŭ mil kongresanoj el pli ol kvindek landoj, estis “Vivanta naturo, floranta kulturo.” En sia fina rezolucio, la Kongreso substrekis la rilaton inter daŭripova natura medio unuflanke kaj daŭripova kultura diverseco aliflanke. Ĝi atentigis ankaŭ pri la fakto, ke la urbo Lahti estis nomita la Verda Ĉefurbo de Eŭropo en la jaro 2021.

La Kongreso dediĉis apartan atenton al la laboro de la nordiaj nacioj en konservado de kultura kaj lingva diverseco inter siaj indiĝenaj popoloj, kaj al la aparta agado de Finnlando tiurilate, proponante ĝin kiel modelon en la klopodoj konservi lingvan kaj kulturan pluralismon.

Universala Esperanto-Asocio fieras pri sia laboro en tiu ĉi Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj kaj alvokas al ĉiuj landoj de la mondo flegi diversecon de kulturoj kaj lingvoj. Ĝi laŭdas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko ĉi-kampe kaj promesas sian subtenon kaj kunlaboron.

Rezolucio de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, Lahtio, Finnlando, 2019

La 104-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lahtio de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2019, kun 917 partoprenintoj el 57 landoj,

traktinte la kongresan temon “Vivanta naturo – floranta kulturo”, en tri kongrestemaj sesioj, pluraj prelegoj, kaj diversaj aliaj kunvenoj kaj ekskursoj en la regiono de Lahtio;

notante la kongruecon de la temo kun la lastatempa nomumo de Lahtio kiel Verda Ĉefurbo de Eŭropo por 2021;

substrekante la ligitecon de la temo kun la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la jaro 2019;

deklaras, ke daŭripova naturo akompanas daŭripovan socion kaj daŭripova socio akompanas egalecan pritrakton de la homoj, ankaŭ rilate lingvon;

avertas, ke la nunaj procezoj de ekonomia tutmondiĝo egale minacas la daŭripovon de kultura diverseco kaj biologia diverseco;

substrekas, ke la Esperanto-movado, kiel movado por alispeca tutmondiĝo bazita sur respekto kaj valorigo de lingva kaj kultura diverseco, estas samtempe movado por daŭripova evoluigo en vasta senco;

atentigas, ke multaj individuoj kaj organizoj en la Esperanto-movado jam aktive laboras por pli ekvilibraj rilatoj inter naturo kaj kulturo, interalie agadoj por interkultura edukado, interhomolutia solidareco, kaj subteno al lokaj iniciatoj por daŭripova evoluigo; kaj

alvokas por interproksimiĝo kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj aliaj organizoj kaj movadoj por la protektado kaj evoluigo de lokaj kulturoj kaj naturmedioj en monda skalo.

La unuan fojon Unesko uzos Esperanton en festivalo

La 19an de septembro 2020 (post unu jaro) Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanio). La laborlingvoj de tiu ĉi festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto. Dum tiu ĉi festivalo, ankaŭ estos projekciitaj filmetoj de kiel eble plej da korusoj tra la mondo, kantantaj por la paco en plej diversaj lingvoj, sed la tekstoj de tiuj ĉi kantoj devos esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj: franca, angla, hispana aŭ Esperanto. Se vi konas koruson, kiu povus realigi tian 3-minutan filmeton de kanto por la paco, en iu ajn lingvo (kun traduko de la teksto al Esperanto) aŭ rekte en Esperanto, kontaktu la UEA-reprezentanton ĉe Unesko d-ro François Lo Jacomo (francois@lojacomo.eu).

UEA prezentos atelieron en Salt Lake City

“Ĉu la angla sufiĉas? Aŭskultante la multajn voĉojn de la mondo” estos la temo dee ateliero selektita por prezento en la Civilsocia Konferenco de UN en Salt Lake City de 26 al 28 aŭgusto. La atelieron gvidos la nove elektita prezidanto de UEA, d-ro Duncan Charters, akompanata de Anna Bennett, el Esperanto-USA, kaj du reprezentantoj de TEJO, la junulara Esperanto-organizaĵo, nome Hans Becklin and Marcus Griep. Ankaŭ partoprenos la reprezentanto de UEA ĉe Unesko, Renée Triolle.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041